

# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novajletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

### RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ



Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale

PLENUMITA 9/11/2018 Tricentnaŭdeknaŭa eldono (unua eldono 20/09/2011)

SENDITA AL 325. La informa kaj noma paĝoj reaperos nur kun la dekaj eldonoj



Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer [rogerspringer@tpg.com.au](mailto:rogerspringer@tpg.com.au);

**Uzindaj ligoj.** \*[openclipart](#)\* \*[PMEGramatiko](#)\* \*[reta-vortaro](#)\* \*[Freelang Vortaro](#)\*  
\*[Plena Ilustrita Vortaro](#)\* \*[Esperanta Retradio](#)\* \*[Google Translate](#)\* \*[Pasintaj AE eldonoj](#)\*  
[Duolingo](#)\* [duolingo all courses](#)

Oni povas meti sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. [rspring@tpg.com.au](mailto:rspring@tpg.com.au)

Entute **752,000** lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **376,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)

Nun studas **307,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas **69,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)

**Telstraj telefondratoj havis problemojn do miaj telefono kaj interreto ne funkciis dum 8 tagoj.**



**Pardonu min. AE399 malfruis.**

La antaŭan ĵaŭdon mia telefono malfunkciis, do malebligis mian konekton al la interreto kaj la multaj helpinformoj kiujn mi ricevas ĉiutage per la komputilo.

Mi fariĝis monda civitano kaj la vivo ne estas facila kiam miaj iloj al la mondo malfunkcias.

**Roger Springer**



## GRAMATIKA SERIO “ĈU VI SCIIS?” N.ro 9 .

Ni menciis ke estas konsilinda uzi nur oficialajn vortojn, kaj ne uzi la centojn da nebezonataj alternativoj neoficialaj. Se ni ne faras tion, Esperanto fariĝos *Basic-European*. La samo aplikiĝu al la gramatikaj reguloj. Bonŝance nek la Akademio nek





la Esperantistaro deziras ŝanĝi tiujn, kvankam dum la historio de la lingvo pluraj tiaj proponoj faratis. Malgraŭ la zorgemo de Zamenhof tamen aperis en la Fundamento kelkaj decidaj eraroj, unu grava kaj du aŭ tri malgravaj. Kion fari pri ili? Intertempe Esperantologoj sukcesis krei, per Fundament'aj reguloj, ĝustajn alternativojn. Same kiel por la malĝustaj vortoj konsilindas agi jene: Ni ne povas ŝanĝi la Fundament'on, sed ni rajtas ne uzi eraran gramatikaĵon. Ni do ne uzu la erarojn kaj uzu la jam trovitajn laŭ-Fundamentajn alternativojn. La nura grava eraro estis, ke en Esperanto ne troviĝis verba Pasiva Voĉo. La nuna konsilo estas uzi la nur pasivsencan sufikson "-ati". Por la malgravaj eraroj: **1e.** uzi, nur se necese, la prepoziciaĵojn "-ate de" kaj "ante al" por du el la kvar signifoj de "de", kaj **2e.** uzi la adjektivon por ĉiuj predikativoj anstataŭ adverbo.

(daŭrigota).

**Marcel Leereveld.**



## La Manlia Esperanto-Klubo



Anoj kunvenas la unuan kaj trian sabatojn je la 10atm.

Bavarian Beer Café, Manly Wharf. Unu taso da klubpagota

kafo atendos vin. La 3a de novembro estis la unua sabato.



Deklara lerneia vizitantino Preskaŭ cent-iara Eunice Graham

Venis al la bela Manlia grupo, Roger Springer, Eunice Graham, John Casey kaj Chris Holliss. . Bona sperto, bona Esperanto, bona loko, bonaj amikoj kaj senpaga kafo. **Roger Springer**

Junaj studentoj vizitis maljunulejon kaj helpis la maljunulinojn



## Aŭstralia floro

jen bildo de bela aŭstralia floro, kiu kreskas sur arbo kun la loka nomo "bottlebrush tree" (pro evidenta kialo).

Kelkaj el ni uzas la formon "skovelarbo", kio estas laŭvorta traduko de la vulgara vorto. La scienca nomo estas "kalistemono".



Kiun version vi preferas? **Trevor Steele**








**BRISBANA ESPERANTO - SOCIETO**

kunvenas la trian sabaton ĉiumonate, 13:30h  
Brisbane Square Biblioteko, Adelaide St.

Vizitantoj estas bonvenaj



Mateno de konversacio  
Je la sabato ĵus pasinta 6 Esperantistoj alvenis al la mateno de konversacio. Erhard kunportis interesan oran moneron el la jaroj de Georgo IIIa de Anglujo kaj ankaŭ el Bavario grandan medalon el arĝento. Ni Esperante babilis dum 2 horoj.

**Doug Eising**



## Informo el Adelajdo

Kviza posttagmezo en Adelajdo  
Trevor Steele jam tradicie preparadas kvizan posttagmezon. La ĉijara okazis la 3-an de novembro en la hejmo de Trevor kaj Katja. Al la 50 preparitaj demandoj plej ĝuste respondis la duopo Benno Lang kaj Andrew Woods (surfote).

**Katja Steele**



Ĉu la neologismoj kiujn vi uzas estas necesaj? Ĉu ili nur malfaciligas Esperanton? **Roger S.**  
 Eĉ la fuŝa studo de la angla plifaciligas la estontan studon de Esperanto en ne latin-alfabetaj landoj. **Roger S.**  
 En Ĉinio multaj homoj iomete lernis la anglan, tio faciligas la lernadon de Esperanto. Eble tio estas la kontribuo de la angla al Esperanto. **Freŝa Maro**





## Lucien Giloteaux forpasis



Karaj,

Kun bedaŭro mi sciigas vin, ke mia patro Lucien Giloteaux forpasis la 3an de novembro. Li lernis Esperanton en 1947, do antaŭ 71 jaroj! Dum la tuta vivo li estis tre aktiva Esperantisto. Li konatiĝis kun mia patrino dank' al Esperanto, li foje instruis Esperanton, sed li plej ŝatis verki artikolojn. Li ofte kontaktis la lokajn ĵurnalojn kaj ankaŭ kunlaboris kun Heroldo de Esperanto. Li multe vojaĝis. Lia unua Universala Kongreso estis en 1950 kaj poste li partoprenis multegajn kongresojn kaj renkontiĝojn.

Lia lasta Universala Kongreso estis tiu en Lille en 2015, en kiu ankaŭ mi partoprenis. Li ofte venis al Aŭstralio kaj renkontis Sidnejajn geesperantistojn kaj ankaŭ partoprenis en pluraj Aŭstraliaj somerkursaroj. Mi aldonas foton de mia patro kun lia tre ŝatata skribmaŝino. La alia foto estas farata dum la UK en Lille. Pluraj aŭstralianoj ja estas sur tiu foto. Mia patro estas la dua de maldekstre. Se vi deziras aŭskulti mian patron, spektu tiun filmeton kiun mi faris en

2009. [https://www.youtube.com/watch?v=G\\_CiQ5sDqic](https://www.youtube.com/watch?v=G_CiQ5sDqic)

Amike, **Nicole Else**



**El Melburno** Estos kelkaj ŝanĝoj al nia kutima rutino dum la sekvaj monatoj, do jen resumo de ili:



11an Nov - ne estos dimanĉa kunveno ĉar mi vojaĝos

12an Nov - ne estos lunda kunveno ĉar multaj homoj estos for

18an Nov - ni kunvenos ĉe ACMI Cafe & Bar kiel kutime

19an Nov - ni kunvenos ĉe Ross House kiel kutime

25an Nov - anstataŭ kunveni, ni eksursos per pramo al Williamstown


26an Nov - ni kunvenos ĉe Ross House kiel kutime

2an Dec - ni kunvenos ĉe ACMI Cafe & Bar kiel kutime

3an Dec - anstataŭ kunveni ni vespermanĝos por celebri gravan membron - kontaktu min se vi volas havi la detalojn

9an Dec - ni kunvenos ĉe ACMI Cafe & Bar kiel kutime

10an Dec - ni kunvenos ĉe Ross House kiel kutime



15an Dec - Zamenhof-festo! Nia jarfina festo kaj la lasta kunveno de la jaro. Sciigu al Heather ([heather@melburno.org.au](mailto:heather@melburno.org.au)) se vi havas ion por prezenti

Niaj kunvenoj rekomenciĝos la 4an de Februaro, 2019.

**Joanne Johns**



## Martina Sachs-Bockelmann vizitis NSKajn klubojn



"Danke al pasportaservo mi konatiĝis kun esperantistoj en NSW. Unue mi vojaĝis trajne al Ourimbah kaj vizitis Alan kaj lia kara edzino. Mi multe ŝatis la korean manĝaĵon. Poste kvankam pluvegis Alan ĉiĉeronis min tra la regiono kaj ni eĉ vidis balenon, kia koincido!





Kafumis, observis pelikanojn kaj multe babilis. Esperanto vigliĝas tra internacia gastameco!



Dankon Alan!  
 Poste mi trajnis al Newcastle kaj gastigis ĉe Kerry. La tuta familio provis esperante interkomuniki, kia bela familio! Ni du marŝadis babilante dekojn da kilometroj tra la urbo, ĉe la maro, vizitis la artgalerion kun amikinoj. Mi kaptis la okazon instrui orientan dancadon al ĉiuj gastigantoj kaj



familianoj.

Miaj esperantaj spertoj en Australio finiĝis kun informbudo ĉe la kultura festivalo. Alvenis dekoj da esperantistoj, por subteni kaj varbi pri esperanto. Kiaj viglaj la Sidnejaj grupoj estas. Mi ne forgesu viziton en la Esperantodomo kie mi partoprenis en konversacia rondo kun Dimitri, Nicole kaj gelernantoj. Dankon gekaraj pro tiaj spertoj. **Martina**



## Facila kaj logika lingvo, ĉu ne?

Nu, ĉu mi loĝas en strato, ĉu mi ne loĝas sur la strato? Aŭ ĉu mi loĝas apud la strato? Kio en la mondo estas strato? Strato estas asfaltaĵo, ĉu ne? Ĉu iu ajn en la mondo elektus loĝi en asfalto, aŭ sur asfalto? Mi supozas ke ne! Do, mi petas vian pardonon, mi certe ne loĝas en strato, nek sur strato, sed mi supozas, ke mi loĝas apud strato.




Ĉu staras domoj en la strato? Ili certe ne staras en la asfaltaĵo, ili staras apud la asfaltaĵo.



Kaj ĉu ili vere staras? Ĉu domoj havas kruojn kaj piedojn kaj povas stari? Certe ne! Domoj ne staras, domoj simple estas! Do en ĝusta Esperanto domoj estas apud la asfaltaĵo, bone ke ili ne enestas ĝin, ĉu ne?

De tempo al tempo buso trairas nian straton. Ĉu vere la buso trairas nian asfaltaĵon? Kompreneble ne, eble ni devus diri ke la buso suriras nian asfaltaĵon.

Sur la asfaltaĵo estas bushaltejo. Tio estas bona kaj akceptebla Esperanto, ĉu ne? Ĉe la bushaltejo sur la asfaltaĵo staras – mi supozas ke nun mi rajtas diri “stari”, kelkaj homoj – kun kruoj kaj piedoj - atendantaj la alvenon de la buso, kiu espereble tre baldaŭ venos. Kiam ĝi venos, oni diras, ke la homoj kaptas la buson. Sed, Dio mia! Ĉu vere ekzistas iu homo, kiu kapablas kapti buson. Devas esti eĉ tre malgranda buso, por ke ĝin povu kapti homo. Ĉu oni trafas la buson? Kial oni volas trafi buson? Ĉu iu vere estas tiom freneza ke li deziras pafi kuglojn al buso? Ĉu oni devus diri “preni” la buson? Mi supozas, ke “preni” buson estas tiom malfacila kiom kapti ĝin. Eble la ĝusta vorto estus “renkonti” buson, kvankam oni ja ne nur renkontas ĝin, oni eĉ eniras ĝin, ĉu ne?



De tempo al tempo la plej bona amiko de la homo, nome la hundo, suriras la asfaltaĵon. Vidante tion, mi ektimas, ke subite venos la buso, trafos la plej bonan amikon de la homo, kaj mortigos ĝin. Tiam mi rapidas sur la asfaltaĵon, kaptas la hundon per ambaŭ miaj manoj kaj metas ĝin en miajn brakojn. Ĉu tio estas bona Esperanto?



Certe kaj kompreneble ne! Kiel en la mondo oni povas meti hundon en siajn brakojn? Estus sufiĉe malfacile meti ĝin en nur unu el siaj brakoj, sed tute ne eblas meti ĝin en ambaŭ siajn brakojn samtempe! Ĉu iu el vi scias la retadreson de Ludoviko Zamenhof? Mi intencas demandi lin, ĉu li povas helpi min solvi tiujn problemojn!



Nun mi esperas, ke iu(j) el niaj pli kompetentaj geesperantistoj pozitive respondos al tiuj miaj iomete treege malfacilegaj problemoj, eĉ problemegoj! **Bob Felby**

## Fali en la ĝardeno .

### ĈU LA ĈEVALO FALAS AŬ ĈU ĜI ESTAS FALANTA AŬ ĈU ĜI FALANTAS ?

Ĉu ŝi skribas la leteron, aŭ ĉu ŝi estas skribanta ĝin, aŭ ĉu ŝi skribantas la leteron? Ĉu la letero skribatas, aŭ ĉu ĝi estas skribata? Ĉu esti aŭ ne esti?



Okcident- kaj sudeŭropaj lingvoj ĝenerale ne zorgas multe pri la diferenco, escepte de la angla, la hispana, Esperanto, kaj kelkaj aliaj. Kaj kio estas la diferenco? La diferenco estas, ke oni mencias AŬ ke la ago kompletiga AŬ ke la ago disvolviĝas sed ne finiĝas. Kaj kial kelkaj popoloj trovas, per sia lingvo, la diferencon grava, dum aliaj popoloj malofte indikas la diferencon aŭ eĉ interesiĝas preskaŭ nur pri kompletaj agoj? Mi ne scias, sed mi suspektas ke tio dependas de la kulturo aŭ de la speco de agemo de ĉiu popolo. Por la hispanoj kaj por la angloj kaj, devige, por la Esperantistoj la diferenco gravas, kaj ili havas specialajn verbformojn por indiki la diferencon. Dum germano kutime simple uzas la vorton por la completa ago kiam la ago ankoraŭ ne, kaj eble neniam finiĝas, en “*Störe mich nicht, ich esse*”, la angloj ne povas diri tion kaj havas specialan verbformon por tiuj

nefinitaj agoj, kiel en “*Don’t disturb me, I am eating*”. Kaj same diferencigaj ni devas esti en Esperanto, ĉar Zamenhof kreis du specialajn sufiksojn por indiki la nefinitecon: “Ne ĝenu min, mi estas manĝanta”. La sama klara diferenco inter kompleta kaj nefinita ago aplikiĝas en la pasiva voĉo: “*The letter is now received just in time*”, “la letero ricevas ĝustotempe”, kontraŭ “*The letter is now being written*”, “La letero estas nun skribata”. Hispanoj kaj angloj do trovas facila, fari klare la diferencon en Esperanto, dum aliaj popoloj trovas tion malfacile aplikebla. Multaj francaj kaj germanaj Esperantistoj eĉ ne scias la diferencon. Ili do devas tre atenti kion ili diras, aŭ ne diras, kaj speciale en la pasiva voĉo, ke ili ne povas diri “La letero estas ricevata nun”, ĉar tio signifas ke nun ĝi ankoraŭ ne estas komplete ricevata, kio ja estas sensencaĵo. Kion ili do devas diri en tiu kazo? Pro interkonsento ili povas diri nur “La letero ricevas”, kio signifas ke la letero faris la pasivan agon komplete, ne duone kiel en “estas ricevata”. La samo okazas ĉe la aliaj tempoj kaj aspektoj: “Hieraŭ la letero ricevatis; Morgaŭ la letero ricevatos; La letero baldaŭ ricevatu; La letero ricevatus, se ....; La letero povos ricevati post horo”, anstataŭ la malĝustaj esprimoj kun “esti”. Sed ĉar multaj francaj kaj germanaj kaj aliaj Esperantistoj preskaŭ neniam indikas en siaj lingvoj la diferencon, ili trovas ege malfacila uzi la ĝustajn formojn en Esperanto (kaj en la angla kaj en la hispana). Ili ne havas tiun problemon, kiam vortoj kun “-anta” kaj “-ata” uzatas kiel epitetaj adjektivoj ĉe substantivo, ĉar tiam la sufiksoj indikas ambaŭ: “bruligataj branĉoj” povas signifi ke la branĉoj bruligatas (komplete) kaj estas bruligataj (nekomplete).

**Marcel Leereveld.**

## ALDONO AL “BALDAŬA” KAJ “ĴUSA” .

Malgraŭ ke mi ĵusan semajnon diris, ke por mi la adjektivoj “baldaŭa” kaj “ĵusa” havas elastan, ja relativan, tempdaŭron, kiel nuancon, mi tamen uzas la adverbojn “baldaŭ” kaj “ĵus” en siaj originaj signifoj de “post resp. antaŭ tre mallonga tempo”. Se mi volas indiki “post resp. antaŭ relative mallonga tempo”, do ke la templongeco estas pli elasta (same kiel ĉe la adjektivoj “baldaŭa” kaj “ĵusa”), mi uzas “baldaŭe” kaj “ĵuse”. Kaj kiam mi deziras indiki ke baldaŭa resp. ĵusa signifas ne nur la proksiman okazon de tempindiko (kiel en “baldaŭa/ĵusa Lundo”), sed krome la mallongecon post kaj antaŭ iu tempindiko (ekz. “baldaŭa Lundo, post nur unu aŭ du tagoj), mi uzas “la baldaŭokazonta/ĵusokazinta Lundo”. Esperanto ja estas lingvo tre riĉa je nuancdiferencoj el unu radiko, kaj Zamenhof estis geniulo ankaŭ pro krei (nudajn) adverbojn sen la kategoria finaĵo. Cetere jam la ĝermanaj lingvoj tion klare aplikas per unu vorto (komparu anglajn *soon* kaj *just* kaj germanajn *bald* kaj *eben* kaj nederlandajn *straks* kaj *pas*).

**Marcel.**

## KOREKTO .

En mia artikoleto “La floroj de Nederlando” mi faris eraron kiun nederlandanoj sendube rimarkis kaj kiun mi nun korektas. Parolante pri la bela spektaklo vidi el supre sur la florantajn pom- kaj pirarbojn profunde en la poldro Betuwe inter du riveroj, mi nomis ilin la Rejno kaj la Ŝheldo, sed tio devas esti inter la riveroj Rejno (nomata tie “*Waal*”) kaj Mewso (*Maas*). La situacio ja estas, ke en la Glaciepoko Nederlando troviĝis ĉe la fino de la glaciriveroj el Skandinavujo, kaj post la glaciepoko Nederlando fariĝis la delto de la riveroj Rejno (el



Germanujo) kaj Meŭso (el Francujo). La akvo de la Schelde, venante el Belgujo, renkontas la akvon de la aliaj riveroj nur en Zelando, la provinco konsistanta el insuloj. La pli norda rivero, Maas (Meŭso) venante tra Belgujo el Francujo, eniras Nederlando en la sudo kaj fluas ĝis unu aŭ du kilometrojn antaŭ la tre granda rivero Rejno, sed neniam edziĝis kun tiu rivero, sed abrupte turnis sin okcidenten por sola eniri en la Nordan Maron, intertempe marĉigante tre grandan parton de Sudholando. Ĝi tamen finiĝas en la Norda Maro ne malproksime de la Rejno. La Rejno mem, tuj post ol eniri en Nederlando, splitiĝis en tri riverojn fluantajn paralele kun intero de nur unu aŭ du kilometroj. La plej granda el la tri branĉoj nomiĝas Waal, la meza Lek, kaj la norda Rejno. La Waal kaj la Lek renkontiĝas apud Roterdamo. La Rejno enmariĝas en la lando de la tulipoj. Krome elfluas el la Rejno pliaj malgrandaj riveroj, el kiuj unu nomiĝas Amstel, kiu donis sian nomon al Amsterdamo. Alia flankrivereto nomiĝas IJssel, kiu donis sian nomon al la antaŭ okdek jaroj el la Zuiderzee (Suda Maro) kreata IJsselmeer. La IJssel fluas rekte norden tra sabla tereno, kiu sablo transportatis en la Glaciperiodo tien el Skandinavujo. La tuta Holando kaj Zelando kaj kelkaj aliaj partoj iutempe estis marŝoj kaj lagoj, iomete ŝirmataj el de la Norda Maro per la sablaj dunoj kuŝantaj el la sudo (Belgujo) ĝis la nordo, Frislando. Ĉar do la tutaj Holando kaj Zelando estis sekigataj per poldroj kaj digoj, la proverbo diras ke “Dio kreis la mondon kaj la Nederlandanoj kreis Nederlando.”

*Marcel Leereveld.*

## RESPONDO AL NEKONATO!

Tute je la fino de la ĵusa A. E. iu, sed ne indikiĝas kiu, petis informon pri kie oni povas ekhavi liston de la alternativoj por nenecesaj neologismoj. Mi proponetas (= *suggest*) fari tiun peton al Renato Corsetti je [renato.corsetti@gmail.com](mailto:renato.corsetti@gmail.com). Eble Renato povos sendi ankaŭ ĉiusemajne listeton de la novaj tiusemajnaj alternativoj.

*Marcel.*

## SENDU ILIN AL MI !

Se iu nelingvospecialisto penos konvinki vin, ke lerni Esperanton estas perdo de tempo, vi verŝajne kapablos refuti lin/ŝin kaj montri, ke Esperanto estas preskaŭ perfekta lingvo en kiu oni povas esprimi ĉiujn homajn pensojn kaj pensnuancojn.

Se aliflanke la persono estas specialisto en lingvoj, vi verŝajne trovos malfacila, refuti liajn/ŝiajn kvazaŭsciencajn asertojn. Tiukaze referencu min al la persono por kontakti min kaj ricevi taŭgajn refutojn, ĉar pro mia Esperantuja funkciado de sekretraportisto (*whistleblower*) mi lernis trovi validajn refutojn kontraŭ ĉiuj falsaj asertoj de la sciencistaj kontraŭuloj de Esperanto. Flarante tion ili verŝajne ne kontaktos min, sed almenaŭ vi havos tialon por ne respondi al por vi malfacilaj asertoj de specialistoj.

*Marcel Leereveld.*



## “Malgrava historieto pri mia vivo” Bob Felby

### Ĉapitro 19 La plej granda miraklo de mia vivo Kvara ero

Vidinte tiom da interesaj lokoj kaj geamikoj, i.a. ankaŭ Arne kaj Gerda, kun kiuj mi iam pasigis tre bonegan novjarvesperon, ni iris al Berlino en Germanujo. Tio estis la



unua fojo, kiam mi vizitis Berlinon, kaj ĝis nun mi ne revidis ĝin, kvankam mi tre volonte farus tion. En Berlino ni ĉeestis Esperanto-kunvenon kun germanaj kaj rusa samideanoj. De Berlino ni iris viziti belegan Amsterdamon, kaj Roterdamon, kie ni eniris la ĉefoficejon de UEA, kaj parolis kun ties gvidantoj. Post tio ni iris al Parizo, kie ni vidis la kutimajn vidindaĵojn: la Ejfelturon, en kiun ni lifte iris ĝis la 2-a etaĝo. Ni ne rajtis iri ĝis la supro, ĉar oni timis teroristojn. Necesas do, ke mi trian fojon vizitu Parizon. Ni vidis ankaŭ la Triumfarkon ktp. ktp. Estas tiom multe por vidi en Parizo. Ni vizitis ankaŭ “Disneyland” iom ekster Parizo. Ĉio estis amuza. Post Parizo ni vagonare iris sub la anglan kanalon al Anglujo. Tiu vojaĝo daŭris precize tri horojn. Tiam ni estis en Londono, en la stacidomo “Waterloo”. Estis tiom bonege ree troviĝi en Londono, sed ni tuj iris vagonare suden por viziti mian bopatrino.

De tie ni eliris ĉiun tagon por viziti malnovajn geamikojn kaj parencojn. Ni ĉeestis eĉ Esperanto-kunvenon en iu urbo, kies nomon mi jam forgesis. Mi fariĝas pli kaj pli forgesema, ĉar mi alproksimiĝas al la fino de mia vivo, tial gravas ke mi tajpu iom pli rapide por fini, antaŭ ol finos sian batadon mia verda koro !

Ĉar ni komprenis, ke ni neniam poste havos tiom da ŝancoj por vojaĝi, ni iris norden al Skotlando. Unue ni iris al Edinburgo. Ni iris aŭtobuse por vidi kiom eble plej multe. Estas iu urbo en la nordo, kiu nomiĝas Inverness. De tie ni iris aŭtobuse esperante vidi la monstron de Lochness. Ĉu necesas diri, ke ni ne vidis ĝin ?

Ie en Skotlando, ni el aŭtobuso vidis vojdirektilon dirantan “Dollar”. Tie loĝas ja lia moŝto William Auld, ĉu ne ? Tre volonte mi volis, ke la busŝoforo iru tien, sed mi ne kuraĝis peti lin fari tion !

Børge flugis al Londono por pasigi du aŭ tri tagojn kun ni. Estis tre bonege. Poste li flugis al Danujo, kaj ni flugis reen al Helsinko. Restinte tie tro da horoj ni flugis al Bankoko. Multajn horojn poste ni flugis al Sidnejo, kaj unu horon poste al Brisbano, kie atendis nin Marko Anglo.

En Brisbano ni restis dek aŭ dek kvar tagojn. Celebrante la naskiĝtagon de Audrey tie, ni fine ree flugis al Adelajdo, kie nin atendis nia filino, Linda. Do nun ni ree estis hejme post la plej bonega ferio, kiun iu ajn, inkluzivante reĝojn, povus havi. Linda veturigis nin hejmen. Sidante disdonante donacaĵojn al la nepoj, bofilo kaj filino, sonoris la telefono. Estis mia nevo, Flemming, filo de Gerda, anoncanta ke Gerda ĵus forpasis. Ŝi tiom bonege eltenis dum ŝi atendis nin, kaj dum ni estis en Eŭropo, sed tuj kiam ni ree estis hejme, ŝi forlasis sian korpon! Mi ne havis pli da larmoj, mi jam elverŝis ilin antaŭ ŝia morto, sed mi memoras ŝin kun danko !

*Daŭrigota* **BobFelby**



**3ZZZ**

.La 28an de novembro okazos la jarkunveno de la radiostacio. Ĝi estas grava ĉar ĉi tiu jaro estas voĉdonojaro. Ĉiuj membroj ricevis tiun informon perpoŝte. Mi petis la membrojn, kiuj ne loĝas en Melburno, sendi mandaton al la radiostacio tiel ke ĝi atingu la radiostacion antaŭ la 26a de novembro kaj samtempe sciigi min per retmesaĝo (fran14@bigpond.net.au) Vi povas elekti unu el la teamanoj, menciitaj en la retejo de la Melburna Esperanto Societo [www.melburno.com.au](http://www.melburno.com.au).



Mi vin antaŭdankas.

La kunvokanto **Franciska Toubale**